

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFANTA ★

N-ro 23, 13. Marto 1921

Jurnalo internacia, universala, sendependa  
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

\* Eliras semajne. \*

### Speciala Numero por la Foiro de Frankfurto a. Majno.

## La Foirurbo apud la Majno.

Malfeliĉa milito detruis ĉion. Ĝi estis katastrofo de universala efiko, kaŭzinte damaĝojn ne antaŭvideblajn. Forigis ilin estas la celo de l' nova Germanujo. Rekonstruado kaj rebonigado estas ĝiaj devoj.

Depost la militfino la tuta laboro estis dediĉita al ĉiuj taskoj. La sama devizo valoros por la estonteco.

En Germanujo vivas la volo je laboro; tamen ni scias ankaŭ, ke ni devas interkonsente kun-

labori kun la eksterlando. Faktaj kaj organizaj premisoj ja ekzistas por tiu ĉi celo.

Ree kunligi la fadenojn de ekonomia trafiko, disŝiritajn per la milito, estas la tasko precipe de industria kaj komerca urbo kia estas Frankfurto a. M., jam ĉiam havinta tiel fortajn internaciajn rilatojn. Mondkonataj estas la industrioj de Frankfurto kaj ĉirkaŭaĵo. Speciale karakterizaj estas la reciprokaj rilatoj inter la Frankfurta bankistaro kaj la eksterlandaj kapital-merkatoj. Frankfurto ekkomencis restarigi ĉiujn ĉi rilatojn interrompitaĵn.

Per tio ĝi plenumas devon, kiu surŝarĝas al ĝi ĝia geografia lokiĝo kiel peranto inter la oriento kaj okcidento, kaj ĝiaj tradicioj. Krome ĝi per tio plenumas taskon indan al urbo de tiel eksterordinare ekonomia signifo.

Samacele estis refonditaj la Internaciaj Foiroj de Frankfurto. Antaŭ 1 1/2 jaroj okazis la Unua Internacia Foiro de Frankfurto. Sekvis al ĝi la dua kaj poste la tria foiro trege sukcesintaj. Kiel impona reprezentanto de la germanaj komerco kaj industrio Frankfurto invitas al la



### 4<sup>a</sup> Internacia Foiro de Frankfurto a. M. de la 10.—16. Aprilo 1921.



Ĝi prezentos denove al la tie amase alvenontaj aĉetistoj el landoj divers-naciaj riĉan, superrigardeble aranĝotan ekspozicion de produktaj kaj komercaĵoj de plej diversa deveno.

La avantaĝoj de la Frankfurtaĵaj foiroj konsistas krom tiuj el la favora geografia lokiĝo en organizaj aranĝoj de speciala valoro. Ĉelante atingi maksimumon da sukceso per eluzo de minimumo da forto, tempo kaj mono, la komitato de la Frankfurtaĵaj foiroj klopodis unue solvi la organizan problemon. En Frankfurto la aĉetisto ne bezonas iri longajn vojojn. En plej proksima najbareco li trovas ĉiujn konstruaĵojn de la ĝenerala kaj de la teknika foiroj. Ili grupiĝas ĉirkaŭ la grandega festhalo kaj formas kvazaŭ urbon por si mem, havante ĉiujn eblojn superrigardeble aranĝi la specimenan ekspozicion. La aranĝo povas esti karakterizata kiel modelo. La severa grupo de la ekspoziciantoj laŭ branĉoj ĝuigas samgrandajn utilojn al ekspoziciantoj kaj aĉetistoj. Ĝi reprezentas eĉ rimarkindan subtenon en la akcelo al la kvalito de la laboro. La direkto de la internaciaj foiroj nenion flankenlasas por havigi al la laŭkvalita laboro rian atenton, kian ĝi povas pretendi. En speciala foira domo „Werkbund“ oni aranĝos ekspozicion

de laŭkvalite senmakulaj artemiaj produktaj. Preskaŭ ĉiuj branĉoj de la industrio, komerco kaj metio estos reprezentataj. La unuan rangon pretendas la teksaĵoj. Al ili estas alligitaj merceraĵoj, ombrelaj, bastonoj, sport-ekipaĵoj ktp. Ili okupas la tutan festhalon kaj plurajn apudajn halojn. En plej nova tempo la moda fako pli grandigis konsiderinde. La led-industrio havas similan rangon: La „Foidomo Offenbach“ vidigas la ekzistantan kontakton inter la urboj Frankfurto kaj Offenbach, bone konata pro ĝia led-industrio. La nomita foidomo estos pligrandigata. En ĝi troviĝos ledaj kaj vojaĝartikloj, bijuterioj kaj horloĝoj. Ne mankos parfumaj kaj tualet-artikloj, kiujn tre ofte serĉas la samaj aĉetistoj.

En la „Orienta Halo C“ lokiĝos la sekcio „Ĝuoj kaj Ledoj“. En la foidomo „Westend“ estos galanteriaĵoj, ludiloj kaj instruiloj. Meblaro kaj aliaĵoj trovas lokon en la foidomo „Bismarck“. La vastspacan domon „Gewerbe-Messhaus“ plengigas la grandaj branĉoj de metalaj, elektro-teknikaj artikloj por malalta tensio, por doma kaj kuirreĵa ilaroj, vitro, porcelano kaj fajencaĵoj. Novaj haloj estas konstruataj por la sekcioj „Bezonoj por

officejoj, paperoj kaj pakiloj“. Sude de la festhalo la grupo „Maŝinkonstruo kaj Elektro-tekniko“ okupas vastajn halojn. Nova foira fako estas la tabakfoiro. Kune kun kelkaj aliaj grupoj ĝi okupas vicon da haloj okcidente de la festhalo. Estas troŝarĝo voli ĉi tie nomi ĉiujn branĉojn.

Jam en la Tria Internacia Foiro la grafika branĉo ludis gravan rolon. Tio vidigis el la interesega faka special-ekspozicio „La Germana Libro“. En la estontaj foiroj librokomerco kaj trafiko estos inde reprezentataj. Mencion valoras ankoraŭ la artofoiro. Ĝi estas instalata en la historia „Roma Domo“ (Römer), okupante tre solenan kaj indan lokon. La artofoiro reunuigas gvidantojn de muzeoj kaj galerioj, kolektantojn kaj komercistojn de art-objektoj kaj de antikvaĵoj el la tuta mondo. Ĝi finiĝas ĉiam per grandstila atakcio de artaĵoj.

Estas evidente, ke la foiroj de Frankfurto ĝuigas ĉiujn praktikajn utilojn atendotajn de la vizitontoj.

En tiu ĉi senco la hodiaŭa speciala numero kunhelpu pligrandigi la aron de la interesatoj kaj akcelantoj de l' paca programo de la Internaciaj Frankfurtaĵaj Foiroj, kiu estas:

## Importo kaj Eksporto

### Akcelado kaj Rekonstruado de la Internacia Interŝanĝo de Komercaĵoj.

#### La rango de Frankfurt en la internacia ekonomia vivo.

Povus ŝajni ne laŭtempe paroli pri la rango de Frankfurto en la internacia ekonomia vivo, dume la germana ekonomio ankoraŭ devas intensige labori por eblilanci la damaĝojn kaŭzitajn per malĝajna milito kaj por ekkomenci denove trankvilan evoluon.

Kaj tamen! La miloblaĵaj fortoj de l' germana ekonomia vivo estas tiel produktigaj, kaj la reciprokaj rilatoj de la internacia trafiko bazas evidente tiel multe sur la ĝenerala neceseco de l' vivo, ke eĉ tia grava okazintaĵo, kia estis la milito, ne povas forigi ilian efikon.

Kiu foliumos en la historio de Frankfurto, sciigos, ke ankaŭ dum la pasintaj jarcentoj ne mankis senteblaj ekonomiaj krizoj kaj ke tamen la malnova spirito de l' Frankfurta komercisto ne lasis subigi sin. Kontraŭe, oni konstato, ke li ĉiam per streĉa laboro trovis vojon supren kaj komprenis akiri al si lokon en la internacia ekonomia vivo.

Estas apenaŭ eble paroli pri la nuna aŭ estonta rolo de Frankfurto en la internacia ekonomia trafiko, ne alligante al la tempoj de la malnovaj foiroj de Frankfurto, kiuj jam antaŭ duona jarcento diskonigis la famon de la metropolo apud la Majno en ĉiujn landojn. Unue estis ĉi tie fremdaj komerc-

istoj kaj negocantoj. Tamen la internacia komerco baldaŭ enradikiĝis. Jam en tiu ĉi ekkomenco de la allokigo de l' Frankfurta grandkomerco la teksaĵa komerco ludis eminentan rolon. Jam en la 16-a jarcento oni povis paroli pri florado de ĉi tiu branĉo en Frankfurto, kiu eĉ ankoraŭ komence de l' 19-a jarcento estis la ĉefa teneja loko por teksaĵoj kaj ŝtofaĵoj, tuloj kaj puntoj, kiu ĝis en la lastaj tempoj povis konservi al si internacian signifon.

Kvankam la sekvoj de l' milito raŭke sentigis tiamaniere, ke ili ĝenis bonajn rilatojn kaj disŝiris avantaĝajn kontaktojn, ĝoige jam plimultiĝas la antaŭsignoj, konkludigitaj la eblecojn pri baldaŭa restarigo kaj rekonstruo.

La novaj foiroj de Frankfurto estas valoraj pilastroj sur la vojo rehavigi al la urbo la malnovan signifon internacian. La ampleksa partopreno de ĉiuj sferoj komercaj kaj industriaj pruvis, ke la foiroj de Frankfurto ne sole reprezentas praktikan manifeston de serioza ekonomia laboro, sed eĉ estas la plenumo de natura ekonomia destino de la urbo. Laŭ la amasaj aliĝoj al la 4-a foiro oni povas supozi kun certeco, ke la taksado de la aranĝotaĵoj plialtiĝos ankoraŭ en la entandaj ekonomi-sferoj, kaj ke precipe la internacia mondo komerca kaj industria partoprenos en granda mezuro.

La signifo de Frankfurto en la internacia ekonomia vivo tamen ne sole konsistas en la eksterordinara okupo de ĝia pogranda komerco kaj de vico de bankofirmoj mondofamaj, sed ĝi apogas sin sur plej evoluiĝintan laŭkvalitan industrian, kiu sukcese-havinte apudiĝis al la pionira laboro de la komerco kaj financa mondo sur la vojo al la internacia ekonomia trafiko. Sufiĉas sole menciigi gvidantajn firmojn de la metal-industrio, de kemiaj uzinoj, el la aŭtomobila kaj elektro-teknika industrioj. Plie la internacia signifo de Frankfurto bazas antaŭ ĉio sur la geografia lokiĝo. Ĝi jam delonge faris Frankfurto centro de l' eŭropa surla trafiko kaj per tio multe uzata loko de internaciaj rendezvoj. La fervojo-trafika signifo de Frankfurto estas plue apogata per la favora lokiĝo je la akvo-vojoj de l' Rejno kaj Majno. Post la efektivaigo de la komuniko inter Rejno-Majno-Danubo ĝi fariĝos eminenta kolektiĝa punkto de l' ekonomia trafiko al la oriento.

Fine estu ankoraŭ rememorigata, ke Frankfurto pionire instigis la utiligon de la aervetura trafiko per la Unua Internacia Aervetura Ekspozicio kaj fondo de la Germana Aervetura Akcia Societo. La ĉiŝta ekspozicio, cetere utiliginte Esperanton por reklamaj celoj, diskonigis la nomon de Frankfurto sur la tuta terglobo. Kun certeco oni povas pro tio supozi, ke Frankfurto foje fariĝos grava centro en la reto de la internacia aervetura trafiko.

Specialan giron meritas ankoraŭ la fakto, ke oni en la evoluo de ĝia ekonomia vivo neniam malentenis la socialan flankon, sed instigis efikas ĝis trans la limoj de Germanujo per multaj modelaj institucioj. La fondo de la universitato donis efikoplenan scian ilaron por la ekonomia vivo. La magistrato kaj la komerca ĉambro daŭre klopodas ektrivi pliajn eblesojn pri ekonomiaj rekonstruoj kaj reformoj.

Kaj tio ĉi fine estas la ĉefaĵo, kio unue sekurigis ĝian signifon en la internacia ekonomia trafiko: ke ĝi ne restas en senaga rememoro al sia granda esinteco, sed streĝigas ĉiujn fortojn en ĉiuj sferoj por la denova supreniro. Tiamaniere Frankfurto sekurigis kaj devos sekurigi al si en estonteco sian lokon apud la granda suno de la ekonomio kaj trafiko.

Pro tio oni povas kuraĝe rekomendi al ĉiuj interesatoj, komercistoj kaj industristoj:

## Vizitu la 4-an Internacian Foiiron de Frankfurto!

### La Eperanto-Fako de l' Foiroŝeĉjo de Frankfurto.

#### Raporto el la Praktiko.

La kreo de aparta Esperanto-sekcio de l' Foiroŝeĉjo de Frankfurto rezultiĝis el sukceshaviga reklamo, kiun faris kelkaj Frankfurtoj esperantistoj.

La interesata leganto de ET rememoros eble ankoraŭ pri la raporto en la speciala priŝira numero lastjara. De tiu tempo la laboro de l' fako nekredible pligrandigis. La praktiko pravis, ke tia laboro ne povas esti farata de grupo. La grupa celo ja ankoraŭ estas alta. Diversaj por-kaj kontraŭ-opinioj pri la reala perspektivo malhelpis la starigon de forumo. Tamen la amplekso de la mekanikaj manipolacioj, la ĉirkaŭo de la korespondado, la serĉo pri reklamaj okazoj ktp. devigis enkonduki laŭplanan organizon, kunlaboran sistemon de kelkaj spertaj helpantoj sub la gvidado de fakulo.

La okazo postulis rapidajn decidojn kaj agon. La skribanto de ĉi tiuj linioj optimiste kaj esperplene eluzis ĝin, kredante al la obstino en la laboro por certa kulturelo. La prijuĝo, ĝis kia grado la persistemo helpis kaj kian valoron reprezentos laŭkreda la praktika sukceso de la tuta laboro, estu lasata al la leganto.

Depost la Dua Internacia Foiro de Frankfurto la Esperanto-servo estas privata laboro de du personoj kun kelkaj pagataj helpantoj. La gvidadon enhavas unu persono, estante en bonrilata kontakto kun la foira oficejo, ĝia konstanta kunlaboranto kaj delonge jam speciala rajtigita de l' foira komitato.

Estas komprenebla, ke servo por tia praktika bezoniga helpilaro: laŭgan kontor-organizon, kartotekon, registron, kolektojn, leter-ordigojn, registradon ĉiusepecan, multoblig-aparaton, skribmaŝinon ktp. La foira oficejo disponigas parton de ĉi tiuj helpiloj, alia parto estas disponigita el la persona posedo de la fakestro.

La plenumo de la laboro mem necesigas fakan scion de l' gvidanto, komercajn spertojn kaj rulojn, scion de la reklamo, propagando-metodojn, praktikan konon de la

presarto kun ĝiaj helpaj faktoroj — resume fakan kaj scian scion.

La peresperanta reklamo famen havas ne sole reale-praktikan flankon, sed ideale-scian karakteron.

Oni devas konsideri, ke la laboro servas al du celoj. Por la foira oficejo la ĉefa celo estas la efiko de la reklamo. La karaktero de la lingvo restas al ĝi plejparte ordinara. Akcelo de la pure lingve-praktika tasko de Esperanto estas subcelo. Por la servantaĵo esperantistoj la afero estas renversa. Por ili la ĉefa celo estas la akcelo de Esperanto. Tamen, efiko de la reklamo signifas sukceson de la helpa lingvo; la uzo de Esperanto estas praktika apliko de la esenca ideo. Kunigi ambaŭ faktojn, ebligis la laŭsajne kontraŭajn celojn, estas la ĉefa tasko de ĉiu peresperanta praktikisto.

Specialan karakteron havas la nuna peresperanta reklamo ankoraŭ pro tio, ke ĝi turnas sin momente al aparta publiko, diverseca laŭ profesioj, medioj kaj okupoj, laŭ nacioj, religioj, rasoj, laŭ viv-opinioj plej diversa. La laboro pro tio devas nune esti diferencata laŭ du vidpunktoj: reale-praktika, ideale-lingvistika. Konforme al tiu ĉi diferencigo la laboro estis dispartigita inter la du ĉefaj agantoj.

La praktikisto uzas la lingvon tia, kia ĝi estas. Kelkfoje okazas al li malfacilaĵoj. Esperanto ja ne estas jam tiel ĝenerale uzata, ke la praktika terminologio estas memkomprenebla. Almenaŭ la ekzistantaj lingva materialo tiurilate ne ankoraŭ estas kolektita. La teoriulo gardas kaj ekzamenas kritike la lingvan priĉaron. La stadio de nia lingva movado eĉ postulas tion. Ĉar evidente la datira kuna laboro en la sama afero egaligas iom post iom la vidpunktojn; kunhelpo de tute senpartia persono estas necesa. Oni trovis tian bonvolan „juĝiston“ en tre fervora aliloka samideano. Valoran, dankindan laboron faris ĉi-loka blindula grupo, kiu komisiite kaj pagite de la foira oficejo plenumis la periodajn ekspedadojn de presajloj.

De multaj metodoj de peresperanta reklamo oni jam por la unua foira elektis la sistemon de ĉirkueroj. Celo de reklamo estas diskonigi interesojn; foira reklamo internacia havas krom tio la gravan celon disvastigi ĝin kiel eble plej malproksimen.

Pro tio oni sendis al ĉiuj konataj delegitoj, grupoj, izolitoj k. c. periode elirintajn ĉirkuerojn pri la aranĝataj foiroj. — Uniforma reklamo estas senefika. Jen pro kio la presajloj devas ĝuigi alternon. Plagiatoj de jam ekzistantaj reklamiloj miskredigis la tutan laboron. En la Frankfurta foira laboro oni pro tio diversmaniere aranĝis la sinsekvajn eldonaĵojn.

La ĉirkueroj eliris por ĉiu foiro en 3 eldonaĵoj de po 6000 ekzempleroj. Ili kaŭzis ampleksan mekanikan laboron, pri kies plenumo oni ne bezonas raportojn.

La efiko de la ĉirkueroj estis duobla. Alvenis multe da gazetoj, gazet-eltraŝaĵoj, kiujn oni devis ordigi, registri, konfirmi kaj pagi. La rezultato de la 3-a foiro estas relative tre kontentiga por la nuna stato de l' praktika uzo de Esperanto. Alvenis

#### 120 gazetoj en 20 lingvoj.

Dua efiko estis la eniro de multege da leteroj, kartoj, demandoj, petoj plenumitaj de pli-malpli diversa karaktero. Ili donis novajn ideojn, planojn, instigojn, parte kaj avantaĝe utiligitajn. La respondokorespondado estis vigla. Ĝi necesigis individuajn prilaktojn, ĉar nia movado bedaŭrinde ankoraŭ tro multe dependas de la bonvolto de la esperantistoj. Plejparte ĝi ankoraŭ renkontas al obstina indiferenteco kaj stoika skeptiko de la publiko. La malforta esperantistaro ne jam ebligas grandseran eluzon. Reakcio pro tio ne devas malkuraĝigi la praktikiston.

Teknikajn malfacilaĵojn kaŭzis kelkfoje la faka scienco. Tiu ĉi laboro okupigis lin la praktikiston, jen la lingviston. Dume la unua devis informi sin pri la teknika celo, la dua devis prilakti al la lingvan flankon, medii klamanierojn oni esprimu tion al ĉiuj. Li devis foliumi en la ne ankoraŭ

kompletaj kaj malakurataj vortaroj. — Multaj maŝinoj, aparatoj, elpensajloj, iloj, materialoj, substancoj ktp. devis esti praktike priskribataj. Ĉefa celo estis, samtempe gajningi el ĉio realan profiton por la foiro aŭ por ĝia aliginto. Entute: la Esperanto-servo reprezentas en si mem modestan instalaĵon de riĉa multflanka kaj interesa praktiko. Pro la reala celo oni devis klopodi per ĉiuj manieroj pligrandigi la interesaron. Kunhelpantoj kun bonaj rilatoj, praktikaj labormetodoj, propraj oficejoj, eluzebaj ideoj ktp. estis preferataj.

Kunhelpilo por tio estis la anoncado en Esperanto-gazetoj. La foira komitato de Frankfurto anoncis en „Esperanto“ (UEA), „Esperanto Triumfonta“, „Germana Esperantisto“, „Esperanto-Praktiko“, „The British Esperantist“ kaj en la faka ĵurnalo „Internacia Komercia Revuo“.

Specialan aĝenton oni dediĉis al la diversaj eldonaĵoj por reklamo. Estis jam ĉiite, ke la ĉirkueroj montris plej eblan varieton inter si mem. Pli evidente tio okazis en la **prospektoj**, kiuj ĉiam aperis laŭ la instigo de la foira direkto. Tiu por la 3-a foiro estis simpla dupaga presajo, tamen efika de la reklama vidpunkto. La prospekto por la 4-a foiro estas beleaga, riĉe ilustrita tri-paga kajero. Al la fakulo ĝi vidigas la kunigon de pri presmetodoj: lito-grafo, libropreso, rotaci-maŝina kupromatrica preso. La prospektoj estas haveblaj en 10 lingvoj. Pruvon, ke la Esperanta eldono faris jam impreson, montras la fakto, ke dum la redakto de la jena raporto ĝi jam estas elĉerpita. Alilingvaj estas ankoraŭ riceveblaj en modesta nombro.

De duobla valoro estas la Esperanto-germana eldono de la „Vortaro de komercaĵoj“, alidone al la dua volumo de l' foira adresaro. Unue ĝi helpas la legadon de l' germanlingva teksto de la adreslibro, due ĝi reprezentas taŭgan komplementon de la ekzistantaj malgranda aro da fak-eimologioj. La dekdu-paga kajero enhavas proksimume 800 fak-esprimojn de komercaj artikoloj en Esperanto kaj germana lingvo. Ankaŭ jen estu lasata al la praktike pensantaj recenzistoj konstati, kian pli vastan signifon ĝi havas por la proesperanta varbado kaj interna fortiĝo de nia movado.

La plej nova eldonaĵo estas la „Antaŭ-Katalogo“, provizora nomaro de la ekspoziciantoj, aligitaj ĝis la 1-a de marto. Ĝi rilatas pro tio rimarkinde el la Esperanta laboro, ĉar la titoloj de la 30 branĉoj krom en 9 naciaj lingvoj estas registritaj en Esperanto. Ĝi helpas al ĉiuj praktikaj komerce agantaj esperantistoj. Oni presis de ĝi 120 000 ekzemplerojn.

Je la fino meritas ankoraŭ citi la leginda „Foirgazeto“, oficiala organo de la komitato. Ĝi estas utiligita por Esperanto (aŭ Esperanto por ĝi) per **senkosta** enpresado de malgrandaĵoj ĉifraj notoj de en-kaj eksterlandaj firmoj, personoj, entreprenoj ktp., kiuj per Esperanto klopodis interrilati kun germanaj respektive eksterlandaj firmoj, servis havigi al si certajn artikolojn, katalogojn, prospektojn, ofertojn, informojn komercajn kaj industriajn ktp. Konsiderante la valoron de praktika enkonduko de la uzo de Esperanto, la fakestro streĉis interesigi pli vastajn sferojn. Ĝis hodiaŭ tio nur estas parte atingita. Suŝice grava estas la fakto, ke la filia oficejo en Berlino, samtempe reprezentanto de la Komercia Ĉambro de Frankfurto kaj administrante la nomitan special-kampon de la „Foirgazeto“, estas en senpera konekso kun la Germana Esperanto-Servo.

Fine estu menciata, ke la foira komitato oficiale akceptis Esperanton tiamaniere, ke ĝi egalvaloris ĝin kiel alian fremdlingvojn.

La rezulto por la germana Esperanto-movado estas esperiga. Estas tasko de la esperantistoj ekkoni tion kaj agi laŭlece. Ke tiurilate ĝis nun nur malmulto okazis, kaj ke ne ĉio, kio brilas, estas oro, mi priskribos en alia artikolo „sub la streko“ (vidu 3-an paĝon).

R. Kr.  
Pro la intima karaktero de la enhavo solo Esperantlingva represo estas rekomendata.



# Oficialaj Informoj.



Nia komitato akceptis la internacian helpan lingvon Esperanto por utiligi ĝin por reklamceloj. Pro tio ni permesas al ni denove, altri la atenton de la esperantistaro al niaj de tempo al tempo elirantaj gazeto-notoj en Esperanto kaj al niaj Esperantaj presajloj.

Plej bona ilo akceli nian reklamon estas la traduko kaj represigo de tiuj notoj. La gazetaro ilin volonte akceptas ĉiam por la aktualeco.

• **Helponde** al nia reklamo, sendu al ni unu ekzempleron de la koncerna gazeto kiel pruvon. Sciigu al ni viajn elspezojn. Ni rekompencos ilin laŭ post via avizo.

Gazetojn, kiuj rifuzis la akcepton, nomu al ni, indikante la akuratan adreson.

Ne enpresigu pagotajn anoncojn ne havante nian firman mendon. En tia kazo sendu al ni proponon, por ke ni decidigu pri la farota.

Notu ĉiam klare legeble vian adreson. Alie vi malebligas al ni respondon.

Por nia oficejo destinatan korespondadon adresu neniam persone.

\*\*\*\*\*

#### Antaŭ-Katalogo.

Ĝis aperis nia „Antaŭ-Katalogo“, provizora nomaro de l' ekspoziciantoj aligitaj ĝis la 1. marto. Ĝi enhavas sur 65 paĝoj aregon da germanaj firmoj, kiuj interese la komercajn rondojn de via urbo.

Por faciligi la traĝadon de la adresaro, la branĉaj titoloj estas indikitaj en 9 naciaj lingvoj kaj en Esperanto.

Ni sendas ĝin senkoste al ĉiuj personoj serioze interesataj, kiuj nin petos pri ĝi per karto aŭ letero.

#### Vortaro de Komerciaĵoj.

Sub tiu ĉi titolo ni eldonis nian liston de komercaj branĉoj en la lingvoj germana, angla, franca, itala, hispana, holanda, dana, norvega, sveda kaj en Esperanto.

La „vortaro“ faciligas la legadon de la Oficiala Foira Adreslibro. Ĝia prezo estas 1 germ.

marko. Al la konataj al ni esperantistoj ni disponigis senkoste 4000 ekzemplerojn. Por sendontoj de gazetnotoj dua senkosta ekzemplero estas rezervita.

#### Foira Adreslibro.

Kompleta nomaro de la ekspoziciantoj. Ĝi aperos duvolume antaŭ la malfermo de l' foiro. Prezo 15 germ. mk. postmandate aŭ bankbilete sendotaj al nia fakulo.

Mendojn ni jam akceptas.

#### Prospektoj.

Nia plej nova ilustrita prospekto en 10 lingvoj trovis tian simpation, ke malgraŭ tre alta eldona nombro nia provizo nun estas malgranda. La Esperanta eldono estas jam elĉerpita. Interesuloj povos eventuale ricevi revenintajn ekzemplerojn.

#### Foirgazeto.

Nia organo „Foirgazeto“ enhavas specialan rubrikon pri serĉataj artikoloj, prospektoj, katalogoj, ofertoj, komercaj informoj, reprezentadoj ktp. Ni akceptas senkoste la enpreson de ĉifraj notoj, enhavantaj tiajn dezirojn. Respondoj en pluraj lingvoj kaj Esperanto estas sendataj al vi pere de la Esperanto-servo de nia filio en Berlino. Estas rekomendinde atentigi pri tio la komercistojn. Samtempe ni scias, ke ni povas peradi firmolistojn el specialaj branĉoj. Skribu al ni vian deziron.

Sole seriozaj aferoj estos respondotaj.

#### Esperanto korespondata kun la tuta ne-germane parolanta eksterlando.

#### Kunlaboro.

Ni akceptas ĉiam proponojn pri kunlaboro pere de Esperanto. Sendu al ni proponon kun klaraj kaj praktikaj detaloj, por ke ni povu ekzameni la aferon.

#### Messamt (Foir-Oficejo) Esperanto-Fako Frankfurt a. M.

#### Notindaj Adresoj en Frankfurt a. M.

[\*] Esperanto oficiale uzata.]

\*) Messamt (Foir-Oficejo)  
Esperanto-Fako  
Frankfurt a. M.

Handelskammer (Komercia Ĉambro)  
Frankfurt a. M.  
Börse.

\*) Verband der Metallindustriellen  
(Sindikato de la metalindustriistoj)  
Frankfurt a. M.

\*) Kaufmännischer Verein  
(Komercia Unuiĝo)  
Frankfurt a. M.

#### Verkehrsverein

(Trafika Unuiĝo)

Frankfurt a. M., Bahnhofplatz.

\*\*\*\*\*

#### Esperantistaj Grupoj.

Esperanto-Grupo Frankfurt a. M.  
Kunveno: Moderne Sprachschule, Goethestr. 10, I. et.  
Lunde je la 7.30 h. vesper.

#### Laborista Grupo Esperantista.

Kunveno: Esperantista Hotelo Anton, Niedenu 12.  
Vendrede je la 7.30 h.

#### Blindula Esperanto-Grupo.

Kunveno: Blindenanstalt, Adlerflichstrasse 8.  
Ĉiutage: Instruisto M. Urban.

\*\*\*\*\*

#### U. E. A.

#### Loka Delegito:

Hans Fricke,  
Niedenu 80 (apud Hotelo Anton).

#### Ĉefa Del. por Sud-Okcidenta Germ.:

Robert Kreuz,  
Schneckenhofstr. 13, III. et.

#### Esperanto-Oficejo Polyglott Club

Goethestr. 10, I. et. — Ĉiutage de 7 h. mat. — 10 h. vesp.



# Foira Revuo.

Lisbono.

La regularo de la I-a Foiro de Lisbono (Nacia kaj Internacia Foiro-Ekspozicio de Specimenoj), malfermita la 10. junio 1921, enhavas jenan parafron:

La oficialaj lingvoj de la Foiro de Lisbono estas la Portugala lingvo kaj Esperanto, sed estas ankaŭ korespondoj kaj propagandaj servoj per la lingvoj franca, angla, germana, hispana kaj itala.

La grava portugala komerca revuo „Portugal Commercial e Industrial“ dediĉis al tio ĉi sufiĉe atencindan artikolon, kiun ni hodiaŭ bedaŭrinde ne povas represi pro manko de loko kaj tial prokrastas ĝis pli bonaj cirkonstancoj.

Barcelona.

La II-a Oficiala Foiro de Specimenoj en Barcelona okazos la 29.—30. aprilo sub la honora prezido de lia reĝa Moŝto Alfonso XIII-a. Ĝi estas organizata de la aŭtoritataj kaj ekonomiaj asocioj de Barcelona. Oni postulu prospektojn kaj aliĝojn en Esperanto de la Foir-Oficejo: Plaza Antonio Lopez n-ro 15 en Barcelona.

Breslau.

Pri la Internacia Printempa Foiro de Breslau (Silezio) okazonta la 5.—8. aprilo, ni preparas specialan numeron riĉe ilustritan, kiu eliros venontan semajnon, la 20. marto.

Padova.

Ankaŭ pri la III-a Internacia Specimena Foiro de Padova (Italio), okazonta la 1.—15. junio, ni intencas presi specialan numeron, eble en majo. Pri tio ni nun intertraktas kun la foira oficejo.

Orienta Foiro de Budapeŝto.

(14.—27. Majo 1921.)

La Budapeŝta Komerca kaj Industria Ĉambro aranĝas nuntempe la ĉiuj-jaran Orientan Foiron kaj esperas grandan eksterlandan partoprenadon. Laŭ eksterlandaj spertoj oni grupigos la ekspozantojn laŭ branĉoj. Adreso de la Foiro: Orienta Foiro, Keleti Vasar, Esperanto, Budapeŝto, V., Szemere u. 6. Kamara.

## Provizora Programo

de la 10-a Kongreso de Germanaj Esperantistoj en Essen, Pentekosto 1921.

Sabato, 14. Majo:

Je 8 h. vespere bonvenigo de la alvenintoj per loka grupo Essen de 1910 en la Krupp-salono de la urba salonaro kaj senĝena kunesto.

Dimanĉo, 15. Majo:

Je 10 h. malfermo de la kongreso kaj salut-parolado de la urbestro d-ro Luther. — Unua laborakunsido.

Je 1 h. komuna tagmanĝo.

Je 4 h. dua laborakunsido.

Lundo, 16. Majo:

Je 10 h. matene tria laborakunsido.

Je 1 h. komuna tagmanĝo.

Je 3 h. ekskurso en la Ruhr-valon. Vespere senĝena kunesto en la urba ĝardeno.

Mardo, 17. Majo:

Pluaj laborakunsidoj laŭ bezono.

Rigardado de minejo kaj de la Krupp-fabrikejoj. Vespere senĝena kunesto ĉe koncerto en la riĉe lumigita urba ĝardeno.

Adreso de la kongreso: Essen, Aldegreverstr. 13 (ĉe sup. poŝtsekr. Klein).

## Provizora Programo

de la Esperanto-Tago en Malmö (10. 4. 21).

Matene: 9.30 h. Kolektigo-konatiĝo.  
10.15 h. Esperanta Diservo (efektivigebla, se nenio malhelpos).

11.00 h. Vojaĝo per Esp. tramoj tra la tuta urbo al vilaŭro.

12.00 h. Kafirinko, fotografado kaj labora kunsido.

Tagm.: 2.00 h. Promeno reen al la urbo.

3.00 h. Komuna tagmanĝo.

P'igm.: 6.00 h. Publika festeno en la granda „Åtulo“ de gimnazio.

Vesp.: 8.00 h. Vespermanĝo, adiaŭa kunveno.

Kotizaĵo: 5 sv. kronoj.

Adreso: s-ro Erik Andersson, Malmö, Rörslögatan 16.

## La Komerca Ĉambro de Reichenberg por Esperanto.

La prezidanto de la ligo de germanaj Esp. Societoj en Ĉeĥoslovakio, s-ro ing. G. Scholze sendis dum printempo pasintjara al la komercaĵ ĉambroj en Reichenberg kaj Eger memorandojn pro enkonduko de Esperanto por la servoj de la komercaĵ ĉambroj. Dum januaro nunjara li ree sendis al ambaŭ ĉambroj memorandojn kaj dum februaro li sciigis ilin pri la akcepto de Esp. per la komerca ĉambro de Paris, aldonante la peton studi la proponon.

Li nun ricevis jenan respondon:

Komerca kaj Metia Ĉambro de Reichenberg. Zl. 4787.

Respondante viajn skribaĵojn de la 24. de januaro kaj de la 22. de februaro n. j. ni petas vin bonvolu akcepti la sciigon, ke la Komerca kaj Metia Ĉambro de Reichenberg tute simpatias kun la Esp. movado kaj estas preta akcepti korespondadojn en tiu ĉi lingvo kaj laŭ deziro ankaŭ respondi en tiu ĉi lingvo.

Reichenberg, la 2. marto 1921.

Administra Komisiono de la Komerca kaj Metia Ĉambro.

Esperantaj gazetoj estas petataj represi la sciigon, por ke la internacia komercistaro eksciu la fakton kaj por ke la komerca ĉambro ricevu korespondadojn en nia lingvo.

## Legantoj atentu!

### Esp. gazetoj represu!

En niaj n-roj 20 kaj 21 ni pritraktis la gravan decidon de la Komerca Ĉambro de Paris pri la nedeviga instruado de Esperanto en la komercaĵ lernejoj de Paris.

Por ke tiu decido estu pli efika, adresu al la prezidanto de la Komerca Ĉambro de Paris, s-ro

La milito kaj la sekvintajoj tion evidente pruvus. La scienco estas komuna posedajo, la sentoj povas tamen esti kaj estas diversaj. Ne ekzistas germana, katolika, protestanta aŭ juda telefono, telegrafo ktp., se vi ne prijuĝas la velocpedon kiel kontraŭ-kapitalistan aŭtomobilon de l' proletariano. Resume: la helpa lingvo same kiel la nacia lingvo ne enhavas specifan feliĉigan, mondoplibonigan sentimenton.

Sub tiu ĉi influo suferis ĝis nun plej grave nia movado. Oni kredis ĉion „esperanigi“ sur maltaŭga fundamento, kiun la plejparto de la homaro (bedaŭrinde!) ne komprenas kaj emas akcepti. De kiam ni sukcesis forigi tiun strangan karakterismon, nia movado trovis pli da atento. Sed, ho vel! Mankis la praktikantoj, kaj tiun ĉi mankon ni konstatas ankoraŭ hodiaŭ.

Nia ĉefa devo estas do unue zorgi pri pli-grandigo de la aktiva anaro. Ni komencu kursojn, instruadojn ĉiam kaj ĉie, kie tio estas ebla. Mi scias bone, ke mankas al ni instruistoj. Pro tio ni devas interesiĝi la instruistojn, kiuj helpas al ni efektiviĝi tion. Tiamaniere ni atingos, ke Esperanto estos disvastigata. Por laŭcelo uzi ĝin, ni devas eduki la anaron en praktika senco. Ni devas forigi la utopian, neverŝajnan, ridindigan, fantazian. Ni ne parolu pri „entuziasmo“, kie tio ne estas oportuna. Festoj ekzemple povas entuziasmiĝi. Ili tamen havas sole reprezentigan karakteron kaj neniel helpas al la ideo en praktika senco. La sukceso rezultiĝas nur el la progreso de la laboro por la kultura celo.

Aludante al la artikolo de nia fervora samideano s-ro Balkanyi en n-ro 13 de ET mi refutas, ke „multaj firmoj, entreprenoj, banejoj ktp. oficiale enkondukis Esperanton ktp.“ Jes, ili ekuzis ĝin foje, tamen tiuj forlasis ĝin, ĉar laŭ la ĝisnuna plimulteca tendenco de la esperantistoj oni devas travivi senteban reakcion. Sole tie, kie trankvile kaj obstine laŭcelo laborantaj anoj (ne „entuziasmuloj“) akcelis la uzon, ni povis konstati konstantecon. Ĝuste la „entuziasmulojn“ la praktikistoj timas. Mi povus tion vidigi per arego da ekzemploj. Ili detruas per ilustrita karto kun insista reklamo por iu ismo (poŝtmarkoj nature bildflanke gluitaj kaj postulataj per la respondo) tion, kion serioza laborulo atingis per multa peno. Ili misuzas la bonan okazon per troa postulo, ekzemple de

Pascalis, kaj al la raportinto, s-ro Baudet, kaj al ĉiuj membroj de la Komerca Ĉambro viajn plej varmajn gratulojn pri tiu decido, destinita por fari la plej grandajn servojn al la homaro kaj precipe al la universala komercio.

Estas konsilinde, ke ĉiuj Esp. gazetoj enhavantaj la decidon de la Komerca Ĉambro sendu po 2 ekz. al s-roj Pascalis kaj Baudet.

Cu ne estus eble, organizi Francan Komercan Esp. Instituton, en kiu oni kunigus la plej gravajn komercajn kaj industriajn firmojn, kaj meti ĝin sub la patronadon de la Pariza Komerca Ĉambro? Tiamaniere oni eble obtenuas certan apogon de la franca komerca ministro, kiu favoras nian movadon, eble eĉ la honoran prezidantecon de la prezidanto de la franca respubliko. Ni opinias, ke la Universa Komerca Muzeo povus esti la bazo por tia grava instituto.

## Tra la Mondo.

Hispana ĉefministro Dato, forlasinte la parlamenton en aŭtomobilo, estis mortigata per revolveraj pafoj la 8. marto. La tri atentintoj forveturis nekonekte.

La aliancoj decidis plenkonsente konsideri la germanajn proponojn pri provizora solvo ne akcepteblaj. Per tio la intertraktadoj estis rompitaj, kaj la sankcioj ekfunkciis.

En sia komenca parolado prezidanto Harding deklaris interalie, ke la nova amerika registaro intencas ekvivi politikon de „neenvolvigo“ en la aferoj de Eŭropo, kaj ke la registaro rifuzas partopreni ĉe la daŭra militista alianco.

Fine de Februaro sin konsistuis en Montreux (Svis.) La Kartelo de Montreux-a Laboro (Le Cartel du Travail Montreusien). Kvardeko da delegitoj, kiuj reprezentis 14 korporativajn kaj sindikatajn grupojn kun entute 1225 membroj, alprenis la statuton de ĉi tiu nova ekonomia organizo. Estis konstituita komitato de naŭ membroj, kies prezidanto estas s-ro Al. Burners, poŝtoficejo kaj konvinkita esperantisto.

Inter la loĝantaro de Ukrainio estas organizita „Komitato de l' Savo de Ukrainio“. Agado de la komitato estas disvastiginta nun tra tuta Ukrainio, okupita de bolŝevikoj. La komitato eldonas vastan ribel-literaturon, kaj estas aranĝitaj filioj en distriktoj kaj urboj. Kun la ribelul-grupoj la komitato estas konstante interrilatita, sendante al ili specialajn agitatorojn cele de informado kaj unuigo de politikaj kaj naciaj demandoj. A. K.

Por la oficialaj Esp. kursoj aranĝitaj de la poŝtministerio sekcio VII kaj de la ferojva direkcio sin anoncis en München (German.) jam 340 poŝt-kaj pli ol 150 fervoj-oficejoj. Pro manko de loko ni devas prokrasti detalan raporton ĝis alia numero.

Por la Printempa Kongreso (10. aprilo) de Rejn-Vestfalia Esperanto-Ligo (Revelo) anoncis sin ĝis 6. marto jam 170 partoprenintoj, inter ili hispano, nederlandano, ĉeĥo, aŭstro kaj franco-bretono. Adreso: Köln, Hohestr. 26.

peto pri tiom kaj tiom da senkostaj ekzempleroj de ia eldonaĵo. Ili miskreditigas la praktike agantan anaron per nelaŭcela aranĝo. Kompren-eble oni ne povas tion postuli de nefakano. Tamen postuli oni povas, ke ĉio restu inter la limoj de l' normala. Ĉu „entuziasmulo“, eĉ „eminentulo“ uzu ian paperan slipon, memfariĝan karton el ia kartonaĵo por skribi al institucio, aŭ fantazian karton kun bildo de nekonaŭta varietate grandulino por kritiki (ĝuste!) la lingvan vidpunkton? Kial oni ne direktas tiajn kritikojn al la ĝusta adreso? Ĉu vi turnas vin al drinkemulo por malhelpi la alkohol-uzon? Ĉu vi vendas cigarojn por malhelpi la fumomanion? Ĉu vi cetere kredas, ke ĉio devas esti laŭ via vidpunkto? Ĉu fine ne ĉiu povas iĝi feliĉa laŭ sia propra recepto? Kaj ĉu vi fine ne povas prijuĝi, kio estas laŭcela? Ĉu vi ne povas rekoni la plej esencan el ia tutaĵo? Mi ne volas diri per tio, ke oni restu indifera. Kontraŭe, oni estu vigla: oni serĉu ĉerpi el la novaĵo la plej valoran por apliki ĝin en alia taŭga formo. Kion nia movado bezonas, estas grandanima, demokrata disciplino.

Ni devas, mi tion diras jam plurfoje, pli-grandigi la stabon de la aktivaj laborantoj. Pro du celoj: praktika kaj eduka. La unua postulas netrosargon de ĉiu individuo, la dua devigas disvastigi la sur la praktiko bazantejn spertojn por akceli la organizon. Ĉiuj vidantoj, kian ajn opinion ili havu, reciproke atentu. Devas esti certa ebalanciĝo en la komuna laboro. Esperanto sendube estas la latino de la demokratio, ĝi povas esti aliflanke ankaŭ helpilo de alia opinio; ĝenerale oni povas uzi ĝin por iu ajn celo, eĉ malbona. La deklaracio de Boulogne tion esprimas, kaj la praktiko tion vidigas ofte, eĉ tro ofte. Anoj, pere de nia genia helpolingvo priŝtelitaj, tion facile povos pruvi.

Kion ni do lernu el tiu admona prediko: ke ni restu kun ambaŭ piedoj sur la tero, ne perdu klaran spiriton kaj ne fariĝu mondofremdaj; ke ni ne karakterizu ĉielan instrumenton nian „karan“ lingvon, la elpensadon de simpla homo, kiu tia resitis ĝis la morto malgraŭ la nepridiskutebla eksterordinara merito; ke ni ekkonu la bonan okazon por servi al la celo, kiun atingi ni intencas.

Por ĉio ni nature bezonas instigan konvinkan komprenon, sed saĝan, kiu igu nin certaj kaj produktigaj por nia tasko.

R. Kr.

## „Pli da praktika uzo de Esperanto!“

Tiun ĉi alarman alvokon ni aŭdis nur de kelka tempo. Ne estas multaj en niaj vicoj, kiuj sekvas al ĝi kaj ankoraŭ malpli multaj, kiuj komprenas tiun ĉi signalon en ĝia esenca valoro.

La malhelpaĵoj estas multoblaj. Nia movado estas ankoraŭ tro malforta, ke oni tion povas plenaryte postuli. Pro tio ni malkuraĝigos realemajn interesojn pri Esperanto, afero tute komprenbla al tiu, kiu klarspирite superrigardas la situacion.

La esenca malbonaĵo estas, ke nia movado estas malsufiĉe organizita de l' praktika vidpunkto. Mi ne pensas en tiu ĉi kazo pri severe laŭsistema, egalliga, burokrata kaj administra organizo, sed pri laŭplana eluzo de la iniciatemoj fortoj ĉiuspecaj.

Pli manko, la plej sentebla, estas, ke la malnova esperantista „generacio“, la nunaj „eminentuloj“, ne zorgis pri sufiĉa posteularo. Mi nature ne parolas pri ties familia pligrandigo, sed pri eduko de fakte laborantaj, aktivaj adeptoj junaj por nia movado. Alia manko estas, ke la multaj fortoj estis disfenditaj je tro multaj sferoj. El tio konsekvencas la nelaudinda fanfaronemo, kiun ni sufiĉe konas precipe el la periodo de la ioma vigliĝo de nia movado. Mi tute ne celas malgrandigi la meritojn de la iamaj pioniroj de Esperanto. Ili ja faris ĉion, kion ili povis fari rilate al la disvastigo de la ideo pri la neŭtrala helpa lingvo. Sed iliaj helpantoj estas kulpaĵ pro tio, ke ili ĉirkaŭumis la nete lingvan problemon per stranga, mistera vualo, kiu tute flankenigis la ĉefan celon.

La plejmulto de la homoj uzas la lingvon kiel simplan instrumenton. Sole malmultaj konsideras ĝin kiel plej bonan organison de l' homo, sole malmultaj estimas ĝin kiel organon de l' vivo, elkora sento-esprimo. Oni uzas ĝin, kiel oni uzas gramofonon aŭ fonografon kaj aliajn helpilojn. Elirante de tiaj konsideroj, estas taktika eraro, interligi la internacian helpolingvon — instrumenton — kun la sentimento, kun ia ismo, kiu enhavas bonan kernon, tamen estas malkomprenata de multaj. Krome ĝi ja havas nenion komunan kun la nura lito. Inter ĉiuj sampensanoj, samideanoj regas konkordo tiel longe, kiel la nudaj intereso ne estas tuŝataj. Tio koncernas ankaŭ la helpolingvan movadon. Mi ne bezonas tion argumenti.

Ĉiulandaj komercistoj kaj industriistoj vizitu la

# 4<sup>an</sup> Internacian Foiron de Frankfurt a. M.

Importo



(Printempa Foiro)  
10—16 Aprilo 1921.



Eksporto

## Ampleksa ekspozicio de sekvantaj branĉoj:

- |   |   |  |
|---|---|--|
| 1. Teksproduktaĵoj.                               | 11. Artikloj por lumigado.                            | 20. Kontor-uzadoj, reklamo.                                    |
| 2. Sportbezonajaro.                               | 12. Metalajoj, elektitaj artikloj por malalta tensio. | 21. Paperoj, kartonaĵoj.                                       |
| 3. Suoj, ledoj kaj aliaĵoj.                       | 13. Kuireja kaj mastrumada ilaro.                     | 22. Pak-materiale.   |
| 4. Ledajoj kaj voĵartikloj.                       | 14. Industrio de vitro, porcelano kaj fajenco.        | 23. Galanterio.  |
| 5. Juveloj, or-, arĝent- kaj ornamaĵoj, horloĝoj. | 15. Medicino, Ĥirurgio, Kaŭĉukajoj.                   | 24. Ludiloj, instruiloj.                                       |
| 6. Artikloj por fumantoj.                         | 16. Sapoj, parfumoj, tualet-artikloj.                 | 25. Meblaro kaj aliaĵoj.                                       |
| 7. Armetio, ĥina kaj japana imitaĵoj.             | 17. Kemia industrio.                                  | 26. Korbajoj, kanplektitaj mebloj.                             |
| 8. Konstruado, higienaj instalaĵoj.               | 18. Brosiloj, balailoj, penikoj.                      | 27. Muzikinstrumentoj kaj notoj.                               |
| 9. Maŝinkonstruado.                               | 19. Tabakproduktaĵoj k. subindustrioj.                | 28. Maŝinoj, instrumentoj por agrikulturo kaj ĝardena kulturo. |
| 10. Elektrotekniko.                               |   | 29. Veturiloj de ĉiu speco.                                    |

Prospektoj kaj Listoj de Komercaj Branĉoj — Antaŭ-Katalogo kun plurlingva kaj Esperanta registro en la lingvoj germana, angla, franca, itala, hispana, holanda, dana, norvega, sveda kaj en Esperanto.

Korespondado en Esperanto!

Oni petu tuj detalajn informojn de

**MESSAMT (Esperanto-Fako) FRANKFURT a. M. (Germanujo).**

## Vapor-Kaldronoj

horizontalaj kaj vertikalaj, de ĉiu grandeco  
\*\*\* kaj diversaj sistemoj, interalie \*\*\*

**Babcock-Wilcox Akvotubo-Kaldronoj**

por normala kaj tre alta vaporigo.

**Fratoj Stork kaj K<sup>10</sup> Hengelo (O) Nederl.**

Nur petoj de gravaj firmoj estos respondotaj.

## Peto.

Samideanoj-inĝenieroj, povantaj havigi informojn kaj katalogojn de firmoj konstruantaj ventmotorojn kaj venturbinojn por akvokonduko kaj elektrejoj, estas insiste petataj skribi al studentino Feliks o Ŝiŝko, Warszawa (Polio), Hoza 42-8.

## Rozoleo bulgara

unuakvalita, por 20 000 bulg. levo  
(16 000 mk.) la kilogramon.

Seriozaj aĉetontoj sin turnu al

**Iv. Krestanoff,**  
Karlovo (Roza Valo), Bulgario.

## 3<sup>a</sup> Internacia Specimena Foiro en Padova (Italio)

1.—15. Junio 1921.



Unua foiro en Italio en neprovizoraj konstruaĵoj (24000 m<sup>2</sup>) kaj tute kovritaj trairejoj, en propra kvartalo de 160000 m<sup>2</sup>.



Ĉiulandaj komercistoj egalkondiĉe akceptataj.  
Ĉiuj industrioj allasataj.

Senpagaj Esperantaj presajoj kaj ĉiuj informoj pri partoprenado, vizitado kaj organizado haveblaj ĉe Ufficio Informazioni della

**3-a Fiera Internazionale di Campioni in Padova (Italio).**

## Internacia Foiro de Breslau

Printempa Foiro  
5-a ĝis 8-a Aprilo 1921

Teksajoj, vestaĵoj, ornam- kaj bijuteri-komercaĵoj, or- kaj arĝentaĵoj, armetio, mastrumadartikloj, mebloj, ludiloj, papero kaj paperajoj, nutraĵoj, drogoj kaj kemiaj produktaĵoj.

Informojn donas

**Breslauer Messe-Gesellschaft m. b. H.**

Esperanto-fako  
Breslau I, Ohlauerstr. 87.

\*\*\*  
**Firmoj**  
kiuj havas intereson por germanaj komercaĵoj (egale de kia branĉo) kaj kiuj serĉas interrilaton kun germanaj firmoj, sin turnu al  
**Karl Purfürst, Plauen i. Vogtl.**  
Schliessfach 154.  
Importo. General-Agentejo. Eksporto.  
\*\*\*

## Jozef Major, Budapest IX.

Remete-u. 36-II-4

studento, veturus kien ajn por la monatoj julio kaj aŭgusto kaj deĵorus kien ajn laboron, se oni donus al li manĝon kaj loĝon.

## Hungara Junulo

19-jara, kiu faros matur-ekzamenon ĉe komerca lernejo en tri monatoj, ŝatus trovi oficon eksterlande. Iom parolas (kaj komerce korespondas) turke, germane, france krom Esp. kaj hungara lingvoj. Prefere vojaĝus Svision, Francion, Holandon, Germanion, Svedion aŭ Hispanion. — Ne tiom la salajroj estas konsiderata ol la ebleco je spert-aktiro.

Mi tre petas la samideanojn, kiuj bonvolus min helpi, skribu viajn afablajn liniojn al tiu ĉi adreso:

Mihael V., Budapest VIII, Német-u. 36-II-13.



## Senpagaj Esperanto-Afiŝoj.

Antaŭ nelonge ni legis en „Esperanta Finnlando“, ke la finnaj administracioj de poŝto kaj fervojoj permesis al niaj fervojaj finnaj samideanoj elmeti en ĉiuj poŝtkontoroj kaj en ĉiuj atendejoj de la stacidomoj reklam-afiŝojn pri Esperanto. Sekve de tio 1500 rulojaj kun tiaj afiŝoj estas ekspeditaj tra tuta Finnlando.

Se ni povus obtieni similan permeson en niaj respektivaj landoj, ni certe atingus gravan venkon. Tamen ĝis tia obtieno ni povos eble longe atendi.

Sed ekzistas afiŝo, kiun oni povas sen permeso elmeti, se ne en ĉiuj poŝtkontoro, sed certe kaj rajte en ĉiuj stacidomo, cetere tute senpage: tio estas nia ĵurnalo „Esperanto Triumfonta“. Donu al la stacidoma kioskisto aŭ gazetvendisto 10—20 ekzemplerojn de nia ĵurnalo por vendi! Ni liveros la bezonotajn ekzemplerojn dufoje senpage. Poste la kioskisto devos antaŭpagi tiom da ekzempleroj, kiom ili bezonos por unu monato kaj ricevos je ĉiuj ekzempleroj rabaton de 50%. **Nevendeblajn ekzemplerojn ni repreneas.**

Per tio vi havos konstantan, tute senpagan kaj tre efikan afiŝon en la stacidomo de via loka urbo. Jam en diversaj lokoj la samideanoj utiligis nian sugestion. Sed la sama devas esti provata en ĉiu loko, kie loĝas esperantistoj.

Faru tuj senriskan provon, la sukceso pravigos vin!

## La Esperanto-Movado en Italio. Esperanto en Lernejoj

La Esp. movado en Italio depost kelka tempo tre vigliĝis. Restarigis grupoj, plioftiĝis kursoj, plilegindigis la naciaj Esp. revuoj „Itala Esperantisto“ kaj „L'Esperanto“.

Sendube la plej atentinda sukceso estas tiu de la samideanoj en Milano, kie — dank' al la grandanima subteno de la urbestro, d-ro A. Filippetti, kiu estas prezidanto de la Milana „Esperanta Domo“ — pli ol mil geknaboj nun estas instruataj en la lingvo Esperanto, kaj — kio eble estas ankoraŭ pli grava — pli ol cent ĝeinstruistoj partoprenas ĉe Esp. kursoj. (Estas menciinde, ke Milano estas la plej grava industria urbo de Italio). Aliaj kursoj por ĝeinstruistoj aranĝis kaj mem gvidas la direktoro de la urbaj lernejoj en Trento, prof. G. Mosma. En Venezia s-ro Pizzi faras kursojn ĉe komunumaj lernejoj. En Genova, Padova kaj Roma funkcias kursoj ĉe la Popolaj Alilernejoj, en Verona ĉe Popola Libera Lernejo.

En Bologna kurso ĉe la Teknika Instituto P. Crescenzi (gvidanto prof. Tellini); en Padova ĉe Teknika Instituto G. B. Belzoni 2 kursoj kun 110 ĝelernantoj, same en Padova kurso ĉe Liceo Tito Livio kun 45 partoprenantoj kaj en la Normalaj Lernejoj Virinaj (unua fako) 58 kaj (dua fako) 57 lernantinoj.

La prezidanto de la Emilia Esp. Asocio, advokato F. Palmegiani preparas novan regularon por proponi al la Reĝa Ministerio por Publika Instruado oficialigon de la Itala Katedro de Esperanto aŭ Itala Instituto de Esperanto.

## La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.

Tradukis laŭ la 5-a Rusa eldono kun permeso de la aŭtoro Maria Sidólvskaja.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio. (17-a datrigo.)

„Aŭskultu, John,“ diris al li la patro: „Jen s-ro Lozinski vin mallaŭdas, ke vi ne plenumas la religiajn ordonojn de viaj prapatroj.“ John, kiu ne trovis intereson en la diskutata temo, ludis kun sia ĉeneto, sed fine demandis: „Ĉu la sinjoro ankaŭ estas hebreo?“

Mateo rektigis. En sia hejmo li certe bone regulus la bubaĉon pro tiaj ofendaj paroloj, sed nun li nur diris:

„Mi estas kristano, mia patro, mia avo kaj la praaĵoj estis kristanoj-unianoj.“

„All right!“ diris John. „Bonvolu respondi al mi: ĉu hebreo povas ŝaviĝi?“

Mateo, pripensinte iom, respondis konfuzite: „Laŭkoscience mi diras al vi, junulo; dubeble...“

„Well! Kiel do vi insistas, ke mi konservu la religion, en kiu mia animo devas peri?“

Kaj vidante, ke Mateo ne tuj povos trovi respondon, li sin turnis kaj revenis al la fraŭlinoj.

„Nu? Kion vi diros?“ demandis Bork, rigardante la Loziŝcanon per siaj akraj okuloj. „Jen kiel ili rezonadas! Kredu al mi, por ĉiu via parolo li trovas tian respondon, ke la longo alĝluigis...“

Laŭ nia opinio, la plej bona religio estas tiu, en kiu homo naskiĝis, religio de patro kaj prapatroj. Tiel opinias ni, malsaĝaj maljunuloj.“

„Komprenable,“ ekĝojis Mateo.

„Ĉu vi scias, kion li respondos al vi pri tio?“

„Kion?“

„Jen kion! Do, en la mondo ekzistas pli ol unu bona religio, ĉar viaj prapatroj konfesis vian

La itala samideanoj ankaŭ sukcesis enpeneiri komercajn rondojn. La Organiza Komitato de la Milana Specimena Foiro reklamas per Esperanto. Same la III-a Internacia Specimena Foiro de Padova uzas la internacian lingvon. La padovaj samideanoj obtenis eĉ sidejon en la palaco de la Komerca Cambio. Ĉe la Reĝa Akademio de Komercio en Trento s-ano Antonioli gvidas kursojn.

Ankaŭ inter laboristoj Esperanto progresas. Estas fondita Unuiĝo de Esperantistaj Fervojistoj (G. Santoni, Via Governolo 24, Torino). Ing. L. Gagnotto en Spezia havas kursojn por maristoj en la admirala ŝipo „Conte di Cavour“.

En Rosignano Marittimo (Pisa) markiza moŝto generalo C. di Montezemolo instigis kaj multe helpis fondi grupon.

Kurso por knaboskoltoj, gvidata de s-ro Cosentino, okazas en Bari.

Interesa parolado de s-ro Alessio estis farata la 21. jan. ĉe Societá di Cultura en Torino, kiun sekvis interdisputo kun ĉeestantaj idistoj kaj kun la aŭtoro de „Latino sine flexione“, prof. Peano de la Universitato Torino. Tiu lasta fine konvinkigis pri la neceso por ĉiuj sinceraj mondlingvanoj propagandi la Esp. movadon.

Al tio ni aldonu la favorajn artikolojn aperintajn lastatempe en multaj tag-ĵurnaloj kaj aliaj gazetoj — kaj ni devas konfesi, ke nia movado en Italio kontentige progresas.

Fine ni rememorigu ankoraŭ, ke la reprezentanto de Italio ĉe la Ligo de Nacioj, s-ro senatano Karlo Schanzer, estis inter tiuj progresemaj delegitoj, kiuj proponis al la Ligo apogon de la Esp. movado.

### ENIGMOJ.

Manuskriptojn de enigmoj oni bonvolu sendi al S-ro Max Butin, Kronprinzenstr. 55, Bad Godesberg, Germ.

SOLVOJ el n-ro 18.

1. Nagasaki,
2. Ireno,
3. Araneo,
4. Dakota,
5. Estremadura,
6. Kato,
7. Tarkvinto,
8. Rombo,
9. Ibsen,
10. Apolo.

Nia Dektria.

Sel', Akto. — Selakto.

Kokono = ono de koko (kok'ono).

### NOVAJ ENIGMOJ.

21.

NOMBRA ENIGMO.	
1	10 11 8
2	12 15 8
3	5 14 8
2	6 7 5 8
4	3 8 15 8
5	3 5 6 8
6	7 16 17 8
7	16 17 10 5 8
8	11 5 12 6 8
9	10 11 5 8

La komencliteroj, legitaj de supre, nomas tradukadon de d-ro Zamenhof.

22.

1	2	1-2 ŝtonejo	2-4 floro
1	5	1-5 besteto	2-5 malsekajo
3	4	1-4 unu el la naŭ fratinoj.	

(Leono Funken.)

[SOLVO] publikigotaj en posta numero.]

## La kripla Pegazo.

Porko malsata sonĝas pri glano, Dolĉan hombonon sonĝas infano, Esperantisto sonĝas pri — rimoj. Ve, el la sonĝo venas la krimoj!

Krimoj de rimoj, versoj de versoj, Sur la Parnaso grandaj renversoj, Fulmas la frunt' sub haroj sen kombo. Ĉiu poet' sin turnas en tombo.

Branĉon li franĉas de la saliko, Fluton li faras kun artificio, Fajfas la fluton, batas la gongon\*) Tordas la cerbon kiel la sponĝon.

Kun la Vortaro Sankta de Rimoj Li al ĉielaj altmalproksimoj Flugas fiere sur la Pegazo, Lin bela Muzo gvidas — ĉe nazo.

Pri la printempo, luno kaj vento, Sepdekseĝoje pri l' nova sento, Pri ŝi, la kafa, kiun li amas Versoj sonoratas, trilas kaj — lamas.

Ĉion li provas, ĉion ekmovas, Gloron eternan li por si kovas, Rompas la ovon, rampas la idio El la ovsel' jen, estas ĝi: rido.

Ĉar ho, la homoj, granda bedaŭro!, Metas foliojn sanktajn de laŭro, Ve, ne sur lian kapon glornoman, Sed kun prefer' — en sukcon terpoman.

Oni senhonte, ve, eĉ kritikis; Hoko de l' moko akre lin pikas. Diras kritika voĉ' serpentsibla Lian Pegazon fajra, sed kripla.

Oni pri l' rimoj diras, ke — surdaj; Pri la arioj diras, ke — gurdaj; Pri lia voĉ', ke estas ĝi rauka; Pri niem la majstro, ve, ke — sentaŭga.

Al la adreso de la poeto Venas sciigo en la gazeto: Versoj la viaj, havu kuraĝon!, Estas tre bonaj — kovri fraĝon.

Sed post ĉi tiu kruda atenco Ĉesas iam en li la pacienco, Kaj li eksplodas, kiel per briko Forte batita gala veziko:

Kiel ekzistus versoj ja bona En Esperanto, la malbonsonat! Tio ja estis tute malsprita Versi en lingvo fuŝe-farita!

Kaj li protestas, plendas kaj ĝemas, Grumblas, mallaŭdas, bruas, blafemas, Krias, malbenas, hurlas sen brido Kaj furioze iras — al ldo.

K. de Kalocsay.

\*) „Gong“ estas ĉina muzika bat-instrumento farita el metalo; oni uzas ĝin kelkfoje ankaŭ en eŭropaj landoj, ekzemple por doni signalon pri la komenco de teatra prezentado.

religion... Ĉu ne vere? Sed niaj prapatroj konfesis nian religion. Kaj tiel plu! La konkludo: la plej bona religio estas tiu, kiun homo mem por si elektas laŭ sia plaĉo... Jen kiel ili parolas, la junuloj.

„La diablo ilin prenu!“ diris Mateo, „Tio signifas ja, kion da kapoj, tiom da religioj!“

„Vi ĝuste divenis. Ĉu malmulte da religioj estas ĉi tie? Je ĉiu paŝo nova religio! Volu eniri dimanĉe la preĝejon de Brooklyno<sup>1)</sup>, vi satridos.“

„Ĉu eble? Ridi en preĝejo?“

„Jes! Ili jen preĝas, jen ridas, jen vriparolas siajn aferojn, jen ree preĝas... Mi diras al vi: Ameriko estas tia lando... Vi mem vidos...“

Longe ankoraŭ tiuj du homoj, la maljuna hebreo kaj la juna Loziŝcano sidis kune kaj parolis pri la religia demando en Ameriko. Dume en la apuda ĉambro la ĝejnuloj ĉiam ankoraŭ babiladis kaj ridis, kaj trans la muro obtuze bruegis la urbeĝo...

X.

La urbeĝo tondre bruegis, kaj Lozinski enlitigante, post kiam li preĝis al Dio, ŝtopis al si la orelojn, por ne aŭdi la teruran brulegon. Li penadis forgesi pri ĝi kaj pensi pri ilia estonta vivado sur kamparo, kiam ili estos trovintaj Osip'on.

Sur tia kamparo, pri kiu ili revadis ankoraŭ en Loziŝci, por kiu la malriĉa Loziŝci petdis por ili ĉian intereson, pro kiu ili kuraĝis travojaĝi landojn kaj marojn, kiu vidigis al ili el trans la horizonto de iliaj revoj, kiel „lando promesia“, kiel la dua patrujo, kiu devas esti same kara, kiel la vera patrujo...

Same kara, sed multe pli bela.

Samaj homoj, sed pli bonaj. Samaj vilaĝanoj en samaj blankaj kiteloj, vilaĝanoj tute similaj al la maljunuloj de Loziŝci, kiuj ankoraŭ ne for-

<sup>1)</sup> Elparolo: Bruklin.

ĝesis siajn iamajn rajtojn, — tamen iliaj kiteloj estas pli puraj, el pli delikata drapo, iliaj infanoj, ĉiuj instruataj en lernejoj, havas pli sanan aspekton, iliaj terpecoj estas pli grandaj, pli fruktoportaj; iliaj ĉevaloj — pli fortikaj, pli bone nutritaj, la plugiloj plugas pli profunde, pli larĝe, la bovinoj donas po unu sitelo da lakto...

Samaj vilaĝoj, sed pli grandaj, kun pli larĝaj, pli puraj stratoj, pli vastaj kaj pli bone lumigitaj domoj kun lignaj tegmentoj... eble, ankaŭ pajlaj, sed el nova, freŝa pajlo. Kaj apud ĉiu domo ĝardeneto! Ĉe la rando de la vilaĝo — drinkejo kun afabla amerika hebreo, — kie vespere basfajfas kontrabaso, elte kunkantas violono, kie en varmetaj printempaj noktoj ĝis tagiĝo estas aŭdataj kantantaj voĉoj kaj piedfrapado de dancantoj, kiel estis iam, antaŭ multaj jaroj, ankaŭ en Loziŝci. En la mezo de la vilaĝo — lernejo, apud la lernejo — nia malgranda preĝejo, eble eĉ uniana...

En la vilaĝo samaj knabinoj kaj junaj virinoj, kiel ĉi tiu Anna, sed ĉiuj pli bone vestitaj kun vizaĝoj ne tiel timemaj, kun okuloj ridantaj, ne plorantaj...

Ĉio samspeca, sed pli bona! Komprenable, samaj vilaĝestroj, sama skribisto, sed li pli timas Dion kaj la superan estraron. Ĉar ankaŭ sinjoroj en tiaj lokoj devas esti pli bonaj, devas ĉiam zorgi kaj observi, ke simplulo en vilaĝo fartu kiel eble plej bone.

Kun tiaj pensoj Mateo endormiĝis, penante ne aŭdi la seninterrompan, obtuzan, profundan bradon. Kiel vento en arbaro ree preterflugis sub la fenestroj la nokta vagonaro, kaj la fenestroj mallaŭte tinitis kaj ekblemitis, dum Lozinski sonĝis, ke sub la rando de l' ŝipo brulobas la oceano. Tuj kiam li alpremadis la kapon al la kuseno, io ree komencis frapadi, turniĝi, ruliĝi, bruegi sub lia orelo... Ĉar super la tero kaj sub la tero senripoze moviĝadis maŝinoj, ruliĝis feraj radoj, kuris ŝnuregoj... (Daŭrigote.)

## Parolejo.

59.

### Esperanto en Rumanio.

Mi legis en ET n-ro 15 artikolon skribitan de s-ano Paŭlo Balkanyj en Budapeŝt (Hungario). S-ano B. plendas pri Rumanio, ke ĉi tie oni ne uzas Esperanton kaj ne estas movado. Sed mi povas sciigi al vi, ke pli ol sep monatojn ni jam lernas kaj disvastigas Esperanton kun tre granda fervoro. Tie ĉi, en Cibi-Lirbo, ni jam havas 75 membrojn. Nia prezidanto kaj delegito de tuta Rumanio estas s-ano Andreo Ce; lia adreso: Targul-Mures, Casa Municipitorii. Tie li jam atingis bongrajn sukcesojn kaj, laŭ mia scio, ili jam estas pli ol cent membroj.

S-ano Gartner Tomaso, Sibiu (Rum.), Rosenanger 6. 60.

„Krom“.

La klarigoj pri „krom“, donitaj de s-ano W. M. Page, Edinburgh, kiun publikigis ET sub n-ro 56, certe estas korektaj, sed ili ne estas kompletaj kaj ne elĉerpas la demandojn; ĉar grave estas krome (kaj tion diras nek Zamenhof nek s-ano Page), ke ĉiam kiam oni volas apliki „krom“, la celata per ĝi persono aŭ aĵo nepre devas ankaŭ ekzisti. Tio ĉi precipe devas esti atentata, se oni volas uzi „krom“ post la vorto „alia“. Ekz.: „... cetere, tiu ĉi vorto havas alian sencen krom...“ signifas, ke la vorto aŭ ĉi tiu havas la alian sencen, celatan per la vorto „krom“. Sed se la celata per „krom“ senceno ne estas ĝusta (i. e. ne ekzistas), sed la vorto havas nur alian sencen, oni devas diri: „... cetere tiu ĉi vorto havas alian sencen ol...“ (Carl Minor).

61.

Pri la komentario al „Lingvaj Respondoj“.  
(Rilatas al 46 kaj 60.)

Laŭ mia opinio s-ro W. Lippmann tute necese defendas sin kontraŭ la riproĉoj de s-roj Fethke en n-ro 15 de ET. Ĉi tiuj simple malkomprenis la intencojn de s-ro L. eldoni pri la boron de la „Lingvaj Respondoj“ de D-ro Zamenhof. Mi ne kredas, ke miaj faroj similas eraron, kvankam la unua informo pri la libro eble ne estis tute klare redaktita. Tamen, dank' al ĉi tiu polemikisto ni nun ricevus interesajn detalojn pri la aperonta verko de s-ro L.

Sendube, fia komentario al la „Lingvaj Respondoj“ estos libro utila kaj necesa, kiel ĝenerale estas dezirindaj en nia literaturo pli ampleksaj kaj sistemaj lingvaj studoj, kondiĉe ke ili ne degeneru en „lingvolaradon“. La ideo de la aŭtoro do estas bonega.

Sed unu detalo en la priskribo de la libro frapis min malagrabla, ĉar pro ĝi la verko certe perdus plejparton de sia valoro. Nome, kial la libro estas intencita nur por germanoj kaj aperos en germana lingvo? Kial „alilingvaj eldonoj eble sekvas“? Kial ili ĉiuj, kune kun la germana, ne povus esti anstataŭigitaj per unu Esperanta eldono? Ĉar „komenciata esperantisto“, i. e. homo, kiu ankoraŭ ne povas pli-malpli libere legi Esperanton, certe ne bezonas fian libron. Ĝi nur konfuzigos lin, se li ne estas lingvistikema. Kaj se li estas fia, tiam ĝi nur helpas al li fariĝi „pibonikisto“, ĉar ne estante kompetenta en la lingvo, fariĝi „pibonikisto“ en la alilando, kontraŭuloj de nia lingvo povos facile misuzi fian libron, por montri la „ne-regulecon“ kaj „komplikecon“ de Esperanto. Krom tio, en germana lingvo ekzistas jam multegaj kaj parte tre detalaj kaj sistemaj lernolibroj.

Kontraŭe, homo kiu jam povas legi Esperanton, se eĉ ne tute libere, havos multe pli da utilo de Esperanta libro. Li tiam samtempe havas la ĉiam bezonatan ekzercon, dum la legado de simila nacilingva verko nur emigas lin al skrupuloza kielado sen praktika bazo.

Kaj pensu, kiel necesa simila libro estas ankaŭ por alinacianoj! Ĝis nun ni ja ne havas ian superan „Lernolibron de Esperanto por esperantistoj“, libron, laŭ ĉiuj ĉiunacaj esperantistoj egale unuece kaj internacie povus perfektigi sian scion de la lingvo. Ĝenerale estas granda malbona flanko en nia movado, ke ni iuloke aŭ iulande tre intense progresigas nian aferon, dum en aliaj rimarkigis eĉ malprogreso. Kial ne apliki sian laboremion al la tuta mondo, se tio estas ebla? (G. Cernohovostov.)

## Recenzejo. LIBROJ.

NEGOCÉ. Annuaire du Commerce Mondial 1921. (Negoco. Jarlibro de la Komercio Tutmonda 1921.) Eldonita de Universala Komercia Muzeo, 8, rue de Chaillot, Paris.

Dika libro francilingva en formo 13 1/2 x 24 1/2 cm. En-havas sur pli ol 600 paĝoj tre valorajn notojn por la komercisto kaj ampleksan Esp. aldonon (Esp. ĵurnaloj, komercio, industrio, turismo). Multaj anoncoj.

VORTARO DE KOMERCAĴOJ. Aldono al la dua volumo de la foira adreslibro de la Internaciaj Foiroj de Frankfurt a. M. Parto Esperanto-germana. Eldonita de Messant (Esperanto-fakto) Frankfurt a. M.

La vortaro (12-paĝa, formata 13:20) estas praktike arĝinta kaj bone helpas al aĉetistoj, nescentaj germanan lingvon, uzaj la foiran adreslibron. Al esperantistoj ĝi estas valora pro la amaso da komercaĵaj terminoj, el kiuj multaj devis esti speciale kreataj aŭ konstruitaj el jam ekzistantaj Esp. vortradikoj. La sufiĉe kompletaj vortaretoj estas rezulto el fervora laboro de niaj s-anoj Kreuz kaj Urban en Frankfurt, kiuj faris per ĝi bonan servon al Esperanto.

## GAZETOJ.

EKLEZIA REVUO. N-ro 11. Kun legindaj artikoloj.

ESPERANTA FINNLANDO. Febr. Tre interesa numero pri „Kanteletar“, la lirika kaj balada poemo de finna nacio. Kun majstraj tradukoj de V. S. kaj de Kolocsay. Riĉe ilustrita.

ESPERANTSKY ZPRAVODAJ. Propaganda gazeto ekskluzive en ĉeĥa lingvo.

HUNGARA ESPERANTISTO. Febr. Kvankam eta, ĝi estas bone redaktata kaj leginda, ankaŭ por eksterlandanoj.

ITALA ESPERANTISTO. Febr. Kun tre interesaj raportoj pri la Esp. movado en Italio.

KATALUNA ESPERANTISTO. Febr. Komunikas, ke la IX-a Kongreso de la Kataluna Esp. Federacio okazos en Girona. La Federacio sukcesis alpreni Esperanton per la Organiza Komitato de la II-a Specimena Foiro de Barcelono por la foir-reklamo.

LA ESPERO. Jan. Kun portreto de s-ro Carl Lindhagen, stokholma magistrato, amiko de lingvo internacia.

LA NIA. Febr. Plej malgranda Esp. gazeto (7:11 cm). Havebla de Albert Chapman, Walton Highway, Wisbech (Angl.).

LA SUDA KRUCO. N-roj 6-7. Jan. Raportoj pri aŭstralaj „Parlamentanoj kaj Esperanto“, kaj aliaj interesaj.

NIA FOLIETO. Sept.-dec. 1920. Hektografita gazeto de la Kalifornia Esp. Rondaro. Ni dankas por la kuraĝiga noto pri ET.

VEGETARANO. Jan. Bulteno kun artikoloj interesaj por vegetaranoj kaj ab-etipeculoj.



# PIX AKTIEBOLAG

(Aktia Societo PIX, antaŭe Ericson & Rabenius)

Fondita en 1897.

Telegrafa Adreso: PIX, Gevle

Kodo uzata: A. B. C., 8-a eldono.

## GEVLE, Svedio.

Fabriko por konfitajtoj ĉiuspecaj, karameloj, bombonoj, altklasaj draĝejoj (sukermigdalaj), ĉokoladaĵoj, glicirizaĵoj kaj — speciale por eksporto —

## Medicinaj Pasteloj kaj Tabledoj.

Solaj fabrikantoj-eksportantoj de la bone konata medicina specialaĵo

# „PIX“

ANTISEPSA  
GLICIRIZA  
PASTELO

kun agrabla kaj refreŝiga gusto.



Rekomendata por ĉiutaga uzado al ĉiu, speciale al fumantoj, kanistoj, paroladistoj, militistoj, sportuloj ktp. Tutmonde akceptita de ĉiuj fumantoj kiel la plej bona rimedo por desinfecti la buŝon kaj gorĝon. — Grandkvante kaj konstante eksportata al diversaj landoj.

Aliaj specialaĵoj:

Higiena Bronka Tabledo „HERBA“, unuaklasa Mentola Bombono „EOR“.

Korespondado dezirata kun pogrande aĉerantaj komercistoj en landoj, kie la fabriko ne ankoraŭ estas reprezentata.

Specialaj pakajtoj kaj prospektajtoj estas laŭdezure farotaj en ĉiu lingvo.

Postulu prezaron kaj senpagajn specimenojn!

## ★ ITALA ★ ESPERANTISTO

Oficiala Organo

de la Federacio Esperantista Italiana.

Eliras regule ĉiumonate.

Jarabono: 15 Liroj. Helpabono: 20 Liroj.

Administrejo: Via Rossari 2, Milano (Italio).

(La raportoj pri la Esp. movado en Italio en la hodiaŭa n-ro de ET estas ĉerpita el „Itala Esperantisto“.)

## Kantoj en Esperanto

la plej konataj germanaj popolkantoj

kaj

originalaj Esperantaj kantoj

sur apartaj folioj.

Presitaj per grandaj, facile legeblaj literoj, kun laŭvorta germana traduko aŭ retraduko kaj kun klarigoj pri la elparolado (por ne-esperantistoj aŭ komencantoj).

Ĉiu kunkantas!

Interese, amuzige, instrue.

Oportunaj kaj plej taŭgaj por sola kaj amasa kantado dum Esp. festoj, ekskursoj ktp.

Prilaboritaj kaj eldonitaj de

Emil Kirchner, Chemnitz (Germ.)

Charlottenstr. 5

Ĝis nun estas 5 kantoj hebeblaj:

1. La Himno, 2. Fratoj, gajon ĝu, nil, 3. Papo kaj sultano,

4. La tilio, 5. Anjo de Tharau.

— Prezo po folio 50 pfg. —

Je grandkvanta mendo grava moderiĝo.

**Esperanto-Verlag Berlin S 59**  
Friedrich Eilersiek --- Wissmann-Str. 46  
(Germanujo).

Esperanto-eldonejo kaj libro-eksportejo liveras ĉiujn haveblajn librojn el Germanujo, eldonas Esperantajn verkojn kaj la gazeton „Esperanto-Praktiko“ ĉiumonata organo por perfektigo en Esperanto.

Esperanto-Katalogo senpage, specimena numero de la gazeto kontraŭ 1 respondokuponon aŭ 1 Mk. germ.

Specialaj katalogoj pri germanaj libroj laŭ deziro.

## Anoncetoj.

BILDKARTOJ Kirschner Frigyes, Budapeŝt VIII, Örménygy-utca 10a. 1-11, kolektas bildkartojn de jenaj pentristoj kaj grafikistoj: L. Kreŝtin, S. Hirsberg, E. M. Lilien, Pasternak, Kaufmann, M. Gottleb, Oppenheim. Rekom-pencas per kartoj de famaj hungaraj pentristoj al laŭ deziro.

DESEGNO-PAPERO. Johano Toman, Budapeŝt IX, Gat-u. 25, 1-8, petas universitatajn studentojn sendi al li tufojn de desegno-paperoj; ĉar en Hungario tiuj nur karege estas riceveblaj. Ĉiun sendon li tuj rekomencos por esperanto.

DU RUSAJ JUNULOJ. Leo Soltirki kaj Johano Kucerenco, deziras partopreni la XIII-an kaj petas gesamideanojn al li helpi. Ili marŝos piede por propagando dum vojaĝo. Ili petas sendi monon nacian, kiel oni povas; kiel dankon ni sendos al ĉiuj sendotoj nian ambaŭman fotografon. Oni sin turnu al s-ro Joh. Cucerenco, str. Le Tolstoj 50, Bender-Tighina, Bessarabio, Rumanio. — Monon sendu en rekomendita letero aŭ per poŝtmandato. Aliaj gazetoj bonvolu represi.

SPORTO. Eugeno Mayer, Budapeŝt VII, Dob-u. 56, fsz. 5, deziras korespondi precipe kun sportistoj kaj interesanĝoj atlekajn poŝtkartojn ilustr. Certe respondas.

SENDU TIUJ vian adreson aŭ anoncon por 5-s eldono de „BES-a Adresaro de Esperantistoj!“ Postulu senpagajn prospektajn — Bohema Esperanto-Servo, Moravany, Bohemujo, Ĉeĥoslovakujo.

INFORM-PETO. S-ino Adele Sommer, el Semlin (Zimany), Hungarujo. Mi petegas kaj kore dankos ian informon pri tiu samideanino. Skribu al s-ro Paulino Santiago, del. UEA, Macaco-Alagoas, Brazilio.

HUNGARA LITERATURO. Pro malatizigita valuto hungara tre malkaraj Esp. libroj el hungara literaturo. Petu proponojn de Hungara Esp. Servo, Paŭlo Balkanyj, Hajos-utca 15-II-2, Budapeŝt VI.

DEZIRAS KORESPONDI AŬ INTERSANĜI:

Jos. Jacob, supera poŝt-administristo, München 2, N. W. 10, Blütenburg Str. 17 L. (Bavarujo), deziras korespondi kaj interesanĝi poŝtkartojn kun gepoŝtistoj eksterlandaj. Mi vendas hungarajn poŝtkartojn, multe pli malkare ol katalog-prezoj. — Kolomano Wiesinger, Budapeŝt VII, Wesselényi str. 50.

Antal Szilösi, Budapeŝt V, Lipesti rakpart 2, Varoŝi land, lernanto, interesanĝas poŝtkartojn ilustr. kun ĉiuj landoj. Emilio Klamert, Budapeŝt VIII, Prater str. 46-1-8, deziras interesanĝi papermonon, insigninojn, poŝtkartojn ilustr., leterojn, poŝtkartojn, kaj Esp. gazetojn.

Karlo Paszly, Budapeŝt VIII, Erzsébet k. u. 54, interesanĝas poŝtkartojn ilustr., poŝtkartojn, gazetojn kun ĉiuj landoj. Julino Strasser, Czeĉe (Fehér m.), Hungarujo, 8-araĝa lernantino, interesanĝas poŝtkartojn ilustr.

Z. Löwinger, lernanto, Budapeŝt IX, Mester str. 9-1-27, deziras interesanĝi poŝtkartojn ilustr., poŝtkartojn kaj poŝtkartojn. Vilhelmo Gerzabek, lernanto, Budapeŝt IX, Tompa str. 18-11-24, deziras interesanĝi poŝtkartojn ilustritajn kun ĉiuj landoj.

Mi serĉas 50 gekorespondantojn por ĉi tieal gekursanoj; ĉiu ricevos respondon! Jozefo Major, Budapeŝt IX, Remete str. 36-1-4.

Louis Berg, Berlin N. 59 (Germ.), Fennstr. 60/L, deziras korespondi per leteroj aŭ kartoj kaj interesanĝi poŝtkartojn kun ĉiujlandaj samideanoj.

Erich Gleis, Breslau 15 (Germ.), Goethestr. 67, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per poŝtkartojn ilustr. kaj interesanĝi poŝtkartojn.

Familio Max Hofmann, Chemnitz (Germ.), Nordstr. 5 Eg, deziras korespondi per poŝtkartojn ilustritajn kun sepa-taga geadvontistoj de ĉiuj landoj.

Varsovio, Poljo, str. Zlota 51, s-ro Konstanty Chmielewski, deziras interesanĝi kun diversaj esperantistoj tufojn. Ricevos ĉiuj sendos al mi diversajn poŝtkartojn militajn, ricevos de mi rekomencojn diversajn neuzitajn kartojn ilustritajn, Lisbono (Portugalujo), David de Carvalho, Rua das Orlarias, 68-4-D-to, deziras korespondadon kun samideanoj ĉiujlandaj kaj anerkituoj al personoj, kiuj interesigas pri la socia movado.

Kiu sendos al mi 25-50 poŝtkartojn de sia lando, ricevos same tiom da nuntiempaj germanaj poŝtkartoj. Karl Kueper, Düsseldorf 3 (Germ.), Graf Adolf Str. 11.

Poŝtkartojn interesanĝas A. Villafranca, str. B. de Irigoyen, 1105, Buenos Aires, Argentina Respubliko. — Minimuma sendo 100 malsamaj pm. de sola lando.

Isidro Fernandez, Pte. Roca 67, Bahía Blanca (Argentino), deziras korespondadon kun samideanoj en ĉiuj landoj.